

**tejo**

tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo

## Revoluciaj retejoj



helpas al vi  
amik-  
umi kaj  
eklabori per  
Esperanto

**Esperanto ĉe  
librofoiro en  
Jerusalemo**

**Nova albumo  
de Martin  
Wiese**

**Tradukado de  
filmoj per  
La Ponto**



Verŝajne vi jam rimarkis, ke la kovrilpaĝo de TT ŝanĝis sian aspekton: Tio estas ĉar antaŭnelonge TEJO ŝanĝis sian emblemon. La konkurson pri nova emblemo de TEJO gajnis

emblemo de Julia Litvinova. Ĝi nun aperas ankaŭ sur la titolpaĝo de TT. Por vidi la ankoraŭ pli belan plenkoloran version de la emblemo, iru al <http://tejo.org/eo/emblemo>.

Ekde ĉi tiu numero, TT havas novan rubrikon, en kiu aperas mallongaj prezentoj de TEJO-membroj; ĝi celas konatigi al la legantoj “normalajn” membrojn de TEJO, por ke oni ne legu ĉiam nur pri la estraranoj kaj aliaj tre aktivaj membroj de TEJO. Ĉiu ajn TEJO-membro povas tiel aperi en TT, se li/ŝi sendas al mi siajn informojn kune kun bildo.

Alia nova afero en ĉi tiu numero estas la artikolinterŝanĝo inter TEJO Tutmonde kaj gazetoj de la landaj sekcioj de TEJO. Aperas en ĉi tiu numero recenzo antaŭe aperinta en JEFO informas (Francio) kaj humura kontribuo antaŭe aperinta en /kune/ (Germanio/Aŭstrio). Samtempe nun aperas en nia kolofono la informo ke ĉiu ajn Esperanto-

gazeto rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde (kondiĉe ke ili mencias la fonton) – espereble la gazetoj de niaj landaj sekcioj uzos ĉi tiun novan eblon.

Aldone mi sciigu vin ke ne estas eraro, ke la informpaĝo sur la antaŭlasta paĝo aperas tute same kiel en la antaŭa numero. Surbaze de propono de nia prezidanto David-Emil Wickström, mi decidis ke ĉiu numero de TT enhavu tian informpaĝon, por ke vi povu facile trovi la gravajn kontaktadresojn kaj bazajn informojn pri la agado de TEJO.

Bonan legadon!

Marcos

## Enhavo

Esperanto ĉe libro-foiro en Jerusalemo .....	3-4
Eta Konversacia Enciklopedio .....	4-5
La Ponto – retpaĝaro por traduki filmojn ...	6-7
Nova rubriko: TEJO-membroj .....	8-9
BEJO-kulturataŝeo vojaĝas en Eŭropo .....	9-11
Esperanto-kurso por skoltoj en Barato .....	11
Revoluviaj retejoj:	
Eklaboru.com kaj Amikumu.com .....	12-13
Recenze:	
Franca libro pri “imagitaj lingvoj” .....	14
Kontakt-informoj kaj informoj pri TEJO .....	19
Recenze: Multe pli ol nenio .....	20

## Limdato por 2007:4 – 15-a de julio 2007!

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu (prefere) rete al [tejo-tutmonde@tejo.org](mailto:tejo-tutmonde@tejo.org) (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), Nürnberger Straße 27a, 04103 Leipzig, Germanio. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton. Redaktisto: **Marcos CRAMER** (Germanio/Britio). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: [oficejo@tejo.org](mailto:oficejo@tejo.org). Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Pollando; rete: [skonpres@poczta.onet.pl](mailto:skonpres@poczta.onet.pl). **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

## Esperanto impone prezentita en la Internacia Libro-Foiro en Jerusalemo

La Foiro, grava evento okazanta ĉiun duan jaron ekde 1963, pasis de 18a ĝis la 23a de februaro en la plej prestiĝa konferenca kaj kultura centro Binjane Ha-Uma en Jerusalemo. Pli ol 1200 eldonejoj kaj institucioj prezentigis ĉi-jare, dum grandega halo estis rezervita por fremdlingvaj libroj, kie ekspoziciis lingvaj-kulturaj institutoj el la tuta mondo (tiom ekzotikaj landoj en israela libro-merkato kiel Norvegio kaj Pollando; Sud-Ameriko; araba landoj: Maroko, Egiptio, Jordanio), enbrakumante entute pli ol 40 landojn.

Guste en tiu internacia salono estis prezentita dum la tuta semajno ankaŭ la Internacia Lingvo. La partopreno en la Foiro, iniciatita de eks-aktivulino de JELI, iĝis vera impresa informada sukceso : pli ol mil homoj vizitis la Esperantan pavilonon, aŭskultante informojn pri la lingvo, respondojn al tiklaj demandoj kaj eblecojn ellerni. Esperanto aperis en la Foiro nur unu fojon en la pasinteco – en 1999, antaŭ la 85-a Universala Kongreso en Tel-Avivo.

La pavilono – portanta la oficialan titolon "Esperanto – la internacia lingvo", ekestis unu el la plej aktivaj kaj vizitataj dum la Foiro, dank' al la abundo de materialoj prezentitaj kaj la vigla agado de la deĵorantoj. De la bretoj de la pavilono la vizitantojn impresis tradukoj de trezoroj el la monda kulturo (Biblio kaj Korano apud *Don Kihoto* kaj *La Eta Princo*), allogaj profesiaj gvidlibroj en Esperanto, *Pasporta Servo*, Esperanto-revuoj el la mondo kaj komikoj. Oni povis gustumi E-muzikon – ĉu tradukitan el la hebrea, ĉu originalan, kaj diversajn E-kursojn kiel *lernu!*, impresiĝi de radio-elsendoj en Esperanto kaj de tradukoj de famaj israelaj kaj hebreaj aŭtoroj.

Krome estis prezentita en la Foiro la ĵus emisiita jubilea israela poŝtmarko "120 jaroj de Esperanto", portanta portreton de



Amri Wandel kaj G. P. Savio  
en la Esperanto-budo

Zamenhof dezajnitajn per lia biografio en Esperanto; kaj ankaŭ specialaj honoraj medaloj "Esperanto" kaj "Zamenhof", same mulditaj por la jubilea jaro.

En la pavilono konstante deĵoris almenaŭ 2-3 esperantistoj, de la 10a matene ĝis la 10a nokte, kaj entute volontulis por la Foiro 13 aktivuloj, inter kiuj multaj aktivuloj de la junulara israela movado. Danke al iliaj klopodoj, pluraj vizitantoj aĉetis elektronikajn kursojn de Esperanto aŭ la DVD-on "Esperanto Elektronike", aŭ registriĝis por kurso en Jerusalemo, gvidatan de la junulo, aktivulo de JELI, Adam Rejzen.

Ĉiutage okazis en la Foiro riĉa kultura agado kiun ankaŭ Esperanto profitis. Amri Wandel, ĉeforganizanto de la pavilono,



Pluraj Esperantistoj antaŭ la Esperanto-budo

partoprenis la publikan konferencon pri la kampanjo "Reskribo de la Biblio", skribante version en Esperanto el la libro Jesaja, kaj sekve diskutis kun la direktoro de la projekto la eblecon lanĉi kampanjon "Reskribo de la Biblio en Esperanto". La fama israela verkisto Amos Oz (aŭtoro de "Rakonto pri Amo kaj

Mallumo"), antaŭ sep jaroj invitita al la honora komitato de 85-a UK en Tel Avivo, post sia publika elpaŝo vizitis la pavilonon kaj ricevis donace la israelan muzik-KDon "Bonvenu Paco". Sed la kulmino de Esperanta agado estis en la kvina tago de la Foiro, kiam okazis publika prelego de Amri Wandel pri "Zamenhof kaj Esperanto: la historio de la internacia lingvo", vaste reklamita dum la Foiro.

Ankaŭ la amaskomunikiloj ne preteratentis la aktivan agadon de esperantistoj en unu el la plej prestiĝaj eventoj: intervjuoj kaj raportoj aperis en reta radio-elsendo en kvar lingvoj, en la usona ĵurnalo *World Jewish Digest* kaj en longa raportaĵo dediĉita ekskluzive al Esperanto, ĉe loka televido. La publiko ĝenerale montris grandan interesiĝon pri la Internacia Lingvo kaj niaj aktivuloj sukcesis krei informadan impeton, kiu jam ekhavis konsiderindan eĥon.

Sergej Tyrin, Israelo

## Eta konversacia Enciklopedio

En la 19a jarcento evoluigis la konversacia enciklopedio, kiu origine celis helpi al la anoj de burĝa socio altnivele konversacii pri decaj temoj en salono. Absolute nepris eviti certajn *nedecajn* temojn, kiuj estis politiko, kritiko de la ŝtato ktp; en aliaj kampoj taksitaj *tiklaj* oni elektu la korektajn vortojn kaj esprimojn. La konversaciaj enciklopedioj de Brockhaus, Herder kaj aliaj tiucele utilis.

Esperanto donas al ni la eblon komuniki sen limoj kulturaj aŭ lingvaj. Tamen, por pruvi ke ankaŭ nia lingvo estas tutordinara lingvo kiel ĉiuj aliaj, ni same enkondukis tabuojn nepriparolendajn kaj kultivas ilin kun plezuro. Komunikado malfacilas malgraŭ Esperanto. jen kelkaj ekzemploj.

**Angla (lingvo).** La angla lingvo plaĉas al vi? Hm... almenaŭ aldonu ke kompreneble vi malaprezas la *fian internacian pseŭdodialekton*.

**Akuzativo.** Spertajn Esperantistojn pruvigaĵas siajn konojn inter aliajn per la uziĝojn de multajn formoj de akuzativo.

**AS.** Vi iris al AS kaj ĝi plaĉis al vi, aŭ vi intencas iri tien – temo maltaŭga por deca konversacio kun konvinkita ano de IS.

**Armeo.** Vi, kvankam pacemulo, malopinias ke armeo en si tamen ne estas la kialo kaj radiko de ĉiuj konfliktoj – se vi amas pacon inter Esperantistoj, evitu la temon.

**Eraro (lingva).** Kelkaj ofendiĝas se vi ilin informas pri siaj lingvoeraraj, aliaj tre

dankemas. Bonan ŝancon!

**Ido.** Ido estis kreita en 1905 por pliriĉigi la aron de Esperantaj insultoj. Ekzemplo: ĉiuj voĉdonas *por*, nur unu voĉdonas *kontraŭ* kaj emfazas ke oni ne agu laŭ jarcentaĝaj dogmoj kaj tradicioj – nomu lin idisto!

**-iĝ-**. Estiĝis bona kutimo ke uziĝu la reflektivformo ĉiam kiam ebligas.

**IS.** Vi iris al IS kaj ĝi plaĉis al vi, aŭ vi intencas iri tien – temo maltaŭga por deca konversacio kun konvinkita ano de AS.

**Komitato.** Vi ne scias precize kion faras la TEJO-komitato? Ne gravas, nek scias multaj komitatanoj. Vi pensas ke la TEJOkomitato malgravas? Tre supraĵa opinio via.

**Kulturo (Esperanta).** Esperantio plaĉas al vi, sed vi tamen preferas legi nacilingvan literaturon kaj aŭskulti ekstermovadajn muzikistojn – estu prudenta, ĉar 98,4% de la Esperantistoj mem estas Esperanto-aŭtoroj aŭ -muzikistoj!

**Libroservo.** Estas malaprezata forlasi renkontiĝon kun mono kaj spaco en la valizo. Iru al la libroservo, ĝi forprenos ambaŭ!

**Malsukceso (de Esperanto).** Nu jes ja, multaj uzas Esperanton kiel primokilo; se ĝi menciitas en la publika diskuto tiam nur en la senco de *ekzemplo por malfunkcio de idealismo*; hodiaŭ, nur kelkaj mil parolas ĝin, kaj tiuj plenerare; la Eŭropa Parlamento rifuzis eĉ nur diskuti pri la diskuto pri Esperanto; sed tio ja ne signifas ke ĝi malsukcesis!!

**Miliono (da Esperantistoj).** Laŭ alt-nombraj taksoj de Esperantistoj ekzistas almenaŭ inter unu kaj kvin milionoj da Esperantisto-parolantoj. Stultaĵo iĝas veraĵo per ofta ripeto.

**Na.** Pardoneblas se vi ne konas na na; skandalas se vi korektas la naan parolon de naisto.

**PIV.** Se vi ne kutimas parkerigi du paĝojn antaŭ endormiĝi, ne tiom gravas. Sed nepre ne

konfuzu *pivon* kun *biero*.

**Ŝli.** Ĉu uzi na ŝli, li aŭ ĝi dependas ĉu via kunkonversacianto estas politike korekta ŝliisto, gramatike korekta PMEGisto aŭ fidela fru-Zamenhofisto.

**UEA.** Neniam aŭdis. Kio estas tio?

**Veganismo kaj Vegetarismo.** Vi ne eksakte scias kio estas la diferenco – pli bone babilu pri la vetero!

**VVĈP.** Jam en 1870 okazis milito inter Francio kaj Germanio pro tio (la oficiala versio ke temis pri Alsaco estas mensogo). Tuŝu la temon kun silkaj gantoj.



La skandala VVĈP el Francio dum la IS 2003/2004 en Germanio

**Zamenhof.** Vi ne havas foton pri via koramik(in)o en via monujo? Ne gravas. Mankas la foto pri la majstro? Ĉu vi certas ke vi estas Esperantisto?

Gregor Hinker, Aŭstrio

(Ĉi tiu enciklopedio origine aperis en /·kune/, la membrogazeto de la Germana kaj Aŭstria Esperanto-Junularoj)

## La Ponto – kuntraduku filmojn!

La Ponto estas retpaĝo por kunlabore traduki filmojn el ajna lingvo al ajna alia lingvo, uzante Esperanton kiel ponton. La Ponto helpas organizi la tradukadon. Tio signifas: por traduki filmon el la hispana al la franca, ekzemple, unue oni tradukas ĝin el la hispana al Esperanto, kaj poste el Esperanto al la franca. Se iu lando volas montri siajn filmojn al la mondo, la sola afero, kiun ĝi devas fari, estas traduki ilin al Esperanto. Poste, ĉiu alia lando akiras aŭtomate la tradukon (en Esperanto), povante traduki ĝin al sia nacia lingvo.

Jen intervjuo kun Ary MANZANA kaj Marco ALVAREZ el la teamo de La Ponto:

**- Rakontu pri Ponto! Kiel ĉio funkcias – rakontu iom pri ĉiuj ŝtupoj de la tradukado, redaktado, korektado ktp.**

Ary: Mallarĝa enkonduko al La Ponto estas, ke ĝi estas retpaĝaro, kiu ebligas traduki kunlabore filmojn de iu lingvo al iu alia lingvo. Ĝi permesas fari tion tre simple kaj facile: vi traduku de via nacia lingvo al Esperanto, kaj alia persono traduku de Esperanto al sia nacia lingvo. Evidente oni povus traduki rekte de lingvo al lingvo, sed ne multaj kapablas traduki, ekzemple, de la ĉina al la pola, kaj reen.

Do en tiu paĝo Esperanto estas ilo, ne fina celo. La paĝo utilas por montri al la mondo ke Esperanto estas vera, pova ilo.

Pri la ŝtupoj de la tradukado: Oni unue alŝutas dosieron, kiu enhavas la traduktekston de la origina filmo. Oni decidas ĉu iu ajn povos helpi en la tradukado, aŭ ĉu vi preferas akcepti la personojn antaŭ ol ties eklaboro. Poste oni elektas linion de la tradukado kaj simple tradukas ĝin, elektante unu el tri nivelojn de fido pri via traduko (malalta, meza, alta), por ke aliaj povu korekti se tio necesas. Dum oni korektas, oni povas sendi komenton, ekzemple, "ne forgesu la akuzativon", aŭ "tie vi bezonas uzi la literon N por montri direkton", do oni lernigas la aliajn

tradukantojn, kaj ankaŭ mem lernas.

**- Kies ideo estas la projekto, kaj kiuj estas la kunlaborantoj de Ponto?**

Marco: La ideo de la projekto aperis por bezono de Argentejo\* kaj de ĉiuj esperantistoj por havi tradukitajn filmojn al sia propra lingvo. La kunlaborantoj estas ĉiu homo kiu eniras al la retpaĝo kaj helpas en iu ajn traduko. Sed, se vi parolas pri la programisto, Ary faris ĉion praktike sole.

Ary: Marko pravas, mi faris ĉion praktike sola, sed la originala ideo estis de Marko (li estas tre humila homo). Mi estas programisto, do mi realigis lian ideon. Dum la programado multaj personoj kaj de Argentejo, kaj de la forumoj, donis al mi utilajn konsilojn, kiujn mi volonte prenis.

**- Ĉu Ponto estas volontul-bazita projekto, aŭ tamen vi planas estontece havi kontraktojn kun film-produktantoj kaj ricevi pagon por tiu, sendube, granda kaj malfacila laboro?**

Ary: Tio neniam estis unu el la celoj de la paĝo. Tamen, se oni proponas tion al ni, ni plezure akceptos.

**- Malsimile al multaj aliaj Esperanto-projektoj, la projekto Ponto celas ne Esperantan publikon, sed ĝeneralan publikon, kaj funkcias pli-malpli kiel internacia, interreta tradukejo - ĉu ne?**

Marco: Jes. Sed, ĝi ĉiam estis orientita al la esperanta publiko.

Ary: Nuntempe oni povas traduki de iu lingvo al Esperanto, kaj de Esperanto al iu alia lingvo, do se vi ne scipovas Esperanton vi ne povos helpi traduki. Tamen, vi povas serĉi filmojn por elŝuti ties tradukon. Do, se la kvanto de tradukitaj filmoj grandiĝas, la kvalito de la traduko grandiĝas, kaj la paĝo iĝas pli konata, personoj elŝutos tradukojn sciante ke ili ekzistas dank' al Esperanto, kaj povos aprezi ties utilecon.

**- Unu granda manko en nia E-movado estas ke multaj esperantistoj, eĉ se oni**

**esperantistiĝis jam de antaŭ jaroj, ne tre bone regas la lingvon. Kiel oni povos certigi la kvaliton de la tradukoj?**

Marco: Nu, ni ege pensis pri tio, kaj estis decidita de ni ke la homoj mem kontrolos sin kaj kontrolos la tradukon. La Ponto havas ĉiujn ajn ilojn por kontroli tion.

Ary: Nu, tio estas ankaŭ la ĝenerala timo pri paĝoj kiel Vikipedio. Tamen en tiaj paĝoj multaj personoj kunlaboras, kaj ofte korektas la aliajn. Tio ankaŭ okazas en La Ponto: oni povas korekti tradukojn de aliaj personoj. Dum oni korektas, oni povas sendi komenton, ekzemple, "ne forgesu la akuzativon", aŭ "tie vi bezonas uzi la literon *n* por montri direkton", do oni lernigas la aliajn tradukantojn, kaj ankaŭ mem lernas. Iom post iom, ĉiuj iĝas pli bonaj en Esperanto, kaj fine la kvalito altiĝas.

**- Kio necesas, por ke projekto Ponto sukcesu kaj bone realigu ĉiujn ideojn de ĝiaj kreantoj?**

Marco: Unue ni bezonas la apogon de la esperantistoj; tio estas ege grava por ni. Sen ili la projekto neniel funkcios.

Precipe programistoj estus granda helpo por ni. Ĝis nun Ary estas laboranta sole, kaj li ne povas labori pri la projekto ĉiam.

Ary: Unue, kiel Marko diras, ni bezonas la apogon de la esperantistoj. Multaj plendas ke nereka traduko inter lingvoj estas malbona ideo. Tamen, se oni ne provas fari tion, oni neniam scios. Kaj dekomence estas tre

malfacile traduki de lingvo al lingvo konservante ĉiujn nuancojn, ili certe perdiĝos, aŭ iomete ŝanĝiĝos. Kaj tio samgrande okazos tradukante per Esperanto. Oni ne forgesu ke oni ĉiam povas vidi la originalan tekstaron por helpi sin en la tradukado.

Estas alia grava, baza problemo pri la paĝo. Ĝi nur permesas alŭti filmojn tradukendajn al alia lingvo. Sed ĝi ne permesas al vi alŭti jam tradukitan filmon, por ke la paĝo ankaŭ funkcii kiel tradukarejo. Tiun problemon ni estas nuntempe pripensantaj.

**- Kiu estas via vizio pri Ponto – ni imagu, ke vi havas ĉion, kion vi bezonas – kia estu projekto Ponto? Kiuj estu ĝiaj mendantoj, kiom da kunlaborantoj ĝi havu, kiom da filmoj jare ĝi traduku ktp. ktp.?**

Marco: Ni kredas ke neniu povas nune respondi tiun demandon.

Ary: Mi tute ne interesiĝas pri statistiko. Se la projekto sukcesas, bonege; estas alia ilo por la esperantistaro, kaj alia pruvo ke Esperanto utilas. Se ĝi ne sukcesas, ne gravas: estis tre amuza fari la paĝon, kaj ĝi neniam malaperos.

Post la intervjuo, Ary ankoraŭ sendis jenan mesaĝon al TT: "Mi forgesis menci ion: kvankam la paĝo estas sufiĉe utila laŭ mi, neniu uzas ĝin... mi ne scias kial, eble vi devas demandi al la uzantoj... eble ĝi ne estas sufiĉe konata, aŭ malfacila por uzi."

\* **Argentejo** – Argentina Esperantista Junulara Organizo

## La Ponto (beta) Esperantc

La paĝo por kunlabore traduki subtitolojn -)

**Registritaj uzantoj**

Ensaluto  Mi estas nova

Kromnomo:

Pasvorto:

Memoru min

**La Ponto** estas retpaĝo por kunlabore traduki filmojn el ajna lingvo al ajna alia lingvo, uzante Esperanton kiel ponton. **La Ponto** helpas organizi la tradukadon.

Tio signifas: por traduki filmon el la hispana al la franca, ekzemple, ni ne tradukas ĝin el la hispana al Esperanto, kaj poste al Esperanto al la franca.

Se iu lando volas montri siajn filmojn al la mondo, la sola afero, kiun ĝi devas fari, estas traduki ilin al Esperanto. Poste, ĉiu alia lando akiras automate la tradukon (en Esperanto), povante traduki ĝin al sia propra lingvo.

**Serĉi filmojn**

Lingvo:

Ane → Ane

Parto de la nomo de la filmo:

## TT havas novan rubrikon

Ekde ĉi tiu numero, TEJO Tutmonde havas novan rubrikon, en kiu aperas mallongaj prezentoj de "normalaj" membroj de TEJO, do de membroj kiuj ne aktivis en la estraro aŭ komitato de TEJO.

Ĉiu membro de TEJO povas tiel aperi en TEJO Tutmonde. Por mem aperi, simple sendu viajn respondojn al jenaj ses demandoj kune kun foto de vi al la redaktisto (tejo-tutmonde@tejo.org): *Kiel vi nomiĝas? De kiu lando vi venas, kaj kie vi nun loĝas? Kiom da jaroj vi havas? Kiel kaj kiam vi esperantistiĝis? Kiujn ŝatokupojn vi havas? Kio estas via vivmoto?*

Per ĉi tiu nova rubriko, TEJO Tutmonde volas ebligi al la membroj de TEJO ekscii unu pri la aliaj, anstataŭ nur ekscii pri estraranoj kaj aliaj tre aktivaj membroj. Aldone, ĉi tiu rubriko espereble montros la internaciecon de nia membraro.

En ĉi tiu numero, ni prezentas du el niaj membroj:

**- Kiel vi nomiĝas?**

Mi nomiĝas Guillermo Bes Salazar

**- De kiu lando vi venas, kaj kie vi nun loĝas?**

Mi naskiĝis en Kubo kaj nuntempe loĝas en urbo Santiago de Kubo, Kubo. Mi estas Kubano.

**- Kiom da jaroj vi havas?**

Mi havas 27 jarojn.

**- Kiel kaj kiam vi esperantistiĝis?**

Mi esperantiĝis la 17an de februaro 2005; mi jam estas du-jara esperantisto, kiu multe ŝatas Esperanton kaj laboras por ĝi. Mi sciis pri Esperanto pere de kunvoko kiun mi legis en la provinca ĵurnalo de mia urbo. Ĝi temis pri nova kurso de Esperanto; unue mi interesiĝis ĉar mi ŝatas lingvojn kaj due ĉar mi estas studema kaj profitas mian tempon en io utila ĉiam.

**- Kiujn ŝatokupojn vi havas?**

Nuntempe mia ĉefa ŝatokupo estas Esperanto; eble mi ŝajnas kiel frenezulo, sed estas la vero, ĉar ĉiutage mi korespondas kun geamikoj, kelkfoje babilas kun geamikoj rete; mi legas revuojn, librojn, retpaĝojn, ktp, kaj mi parolas kun mi mem esperante. Mi ankaŭ instruas Esperanton en mia urbo, nuntempe mi havas 6 gelernantojn kiuj lernas en la dua nivelo de la Bazregula Kurso.

Mi ankaŭ ŝatas ludi ŝakon; ĝi estas mia preferata sporto. Mi amas legi; mi estas legema kaj mi multe ŝatas naĝi. Mi ankaŭ ŝatas lerni fremdajn lingvojn; mi eklernis la francan lingvon, kaj mi iomete parolas la anglan lingvon.

**- Kio estas via vivmoto?**

La triumfo estas por tiuj, kiuj klopodas.



Guillermo Bes Salazar el Kubo



- *Kiel vi nomiĝas?*

Jonathan Moylan

- *De kiu lando vi venas, kaj kie vi nun loĝas?*

Mi naskiĝis en Aŭstralio, kaj mi ankoraŭ loĝas tie, en mia hejmurbo (mi ĵus revenis de unujara loĝado en mia alia hejmlando, Belgujo).

- *Kiom da jaroj vi havas?*

Mi havas 18 jarojn (ĉi-sabate la 3an de marto mi ekhavas 19 jarojn).

- *Kiel kaj kiam vi esperantistiĝis?*

Antaŭ iom pli ol 5 jaroj mi esperantiĝis - tre simple mi trovis la libron "Teach Yourself Esperanto" en la librobretaro de mia patro kaj tuj eklernis kaj ekuzis Esperanton.

- *Kiujn ŝatokupojn vi havas?*

Muziko (violono, gitaro), Festado (tre grava!), aktivismo (homaj rajtoj ktp), lingvolernado.

- *Kio estas via vivmoto?*

Estu la ŝanĝo, kiun vi volas vidi en la mondo - Mahatma Gandhi



Jonathan Moylan el Aŭstralio

## BEJO-Kulturataŝeo 2006

Pionira konkurso de la Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO)

**Pasintjare (en 2006) okazis en Brazilo unuafoje la konkurso "BEJO-Ataŝeo", anoncita en 2005. Por ĝin partopreni oni devis verki sciencan eseon enhavantan de 30 ĝis 40 paĝojn, kaj aliĝigi minimume 5 personojn al BEJO. La limdato por sendi la eseon estis la 17-a de junio de 2006. Kaj dum la 41-a Brazila Kongreso de Esperanto ĉiuj partoprenintoj prelegis dum 20 minutoj antaŭ juĝistaro kaj publiko. La oficiala paĝo de la konkurso estas:**

**<http://bejo.esperanto.org.br/ataŝeo2006.html>**

Kiel pri la premio de tiu ĉi konkurso? De 3 ĝis 12-monata vojaĝo tra Eŭropo kiel kultura reprezentanto de Brazilo al la esperantistoj (flugbiletoj, veturbiletoj kaj vojaĝasekuro).

Permesu tion ke mi min prezentu; mi estas Luko (Lucas VIGNOLI REIS), 22-jara studento pri fiziko, la nuna kaj unua BEJO-Ataŝeo. Mi alvenis en Eŭropon la 28-an de

Decembro de 2006 kaj revenos al Brazilo la 24-an de Junio ĉi-jare. Mi estas do en la mezo de la vojaĝo; multo ankoraŭ mankas por ĝia finiĝo. Mi jam partoprenis Internacian Seminarion en Germanio; fakte tiu ĉi junulara festo estis mia unua vojaĝcelo; tie mi prelegis trifoje: pri Brazilo, pri brazila muziko kaj pri religiaj baroj (la temo de la eseo).

Krom ĝui la vojaĝon kaj amuziĝi vojaĝante tra Esperantujo (tiamaniere instigante pli da junuloj partopreni la venontan konkurson) oficiale la venkinto havas la jenajn devojn: prelegi almenaŭ 6-foje pri Brazilo ĉe 6 malsamaj urboj pere de materialo donacita de BEL, paroli dum la venonta BKE en Rio de Janeiro pri la sperto en Eŭropo, kaj verki minimume du artikolojn pri la tuta afero al esperantistaj gazetoj.

Tamen nature aldoniĝis al la "devoj" kelkaj aliaj celoj: prelegi pli, ankaŭ prelegi pri la

esploro disvolvigita por la konkurso, fari gravajn kontaktojn ĉie, diskonigi tiun ĉi iniciaton (ho, jen tio, kion mi faras nun), helpi okazigi la venontan konkurson kaj venigi kiel plej eble multe da esperantistoj al la venonta brazila kongreso – la ĉi-jaraj BKE kaj la BEJK okazos samtempe de la 8-a ĝis la 13-a de julio ĉi-jare en Rio de Janeiro, centjarigo de BEL, 40 jaroj de BEJO, ĉirkaŭ 700 da personoj atentataj (laŭ mi), senpaga aliĝo por alilandanoj; kion vi atendas por aĉeti la flugbiletojn? Menciindas ankaŭ ke ĉion ĉi mi ĝue kaj gaje faras!

Mi jam estis en IS, Amsterdam, Barcelona, Weil am Rhein en Germanio, Toulouse, Lille en Francio, Herzberg am Harz (la Esperanto-urbo en Germanio) kaj Milano. Nun mi skribas de Cupramontana, kampara urbo de Italio. Poste mi ĉeestos PSI en Germanio, okazigos brazilan festivalon kadre de IJF en Italio, rondvojaĝos monate Italion, iros al HELA en Pollando, al la Primitiva Rekontiĝo en Nederlando, al la Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno, krom viziti plurajn urbojn.

Ĉie mi estas tre kore akceptata kaj gastigata de la esperantistoj, ĉie mi iĝas amiko de tre bonaj personoj, ĉie mi ekhavas tre unikan kaj belan sperton; estas nekredeble, kaj mi eĉ povis finfine persone renkonti du grandajn korespondamikojn, Katrin de Toulouse kaj Max de Cupramontana. Tamen, se mi skribas



prelegante en Tuluzo pri Brazilo

pri miaj spertoj ĉi tie, mi ne sukcesas ne plenigi dekopojn da paĝoj. En mia retejo troviĝas miaj plankalendaro, fotoj, flimetoj kaj semajnlibro; se vi scivolemas eniru: <http://lucasvignoli.multiply.com>.

Tiu ĉi pionira iniciato estas kuna iniciato de BEL kaj BEJO. Grandparte sponsorita de Oomoto – koran dankon Oomoto – kies helpo estis nemalhavebla por ke tiu ĉi konkurso okazu. Kaj tre gravan apogon ni ricevis de la Itala Organizo de Esperanto (FEI) kaj de Marco MENGHINI, Aldo GRASSINI, Daniella GRASSINI kaj Renato CORSETTI. Sen ilia helpo la vojaĝo nur povus esti trimonata, kaj ne sesmonata; koran dankon.

Jen alia bela afero pri tiu ĉi projekto: ĝi kunigas multajn fortojn kaj homojn; ĉar mi realigas mision, ĉie oni helpas al mi tre volonte bone ĝin realigi. Koran dankon al ĉiuj.

Aliflanke, unuafoje oni sendas tian reprezentanton al Eŭropo, kaj ne ĉio glate okazis, ĉefe rilate al la unua monato (legu miajn vojaĝraportojn ĉe la adreso supre menciita), tamen mi pensas ke mia sperto sufiĉos por ke venontfoje ĉio pli glate okazu. Unuaj fojoj ĉiam estas pli malfacilaj, kaj la rezulto ne estas tiel brila kiel povus esti. Tamen pro la helpo de la esperantistoj mi sukcesis bone solvi la problemon kaj replani la vojaĝon. Specialan dankon pri tio mi ŝuldas al Aneta, Aldona kaj Grazyna UBIK, mia dua familio tie ĉi.

La ideo estas ke tiu ĉi povu fariĝi ĉiujara aŭ podujara. Ni esperas ke pere de la rezulto



En Herzberg am Harz (la Esperanto-urbo), ĉe leciono de Esperanto, mi igis la infanojn danci brazilajn rondancojn

tiu ĉi unua fojo ni povos akiri plenan sponsoradon, kiam la tuta afero estos eĉ senkosta por BEL kaj BEJO, kaj nur estos fruktodona. Ĉifoje ni jam ricevis materialon pri Brazilo de EMBRATUR (oficiala organo brazila pri turismo).

Mia retpoŝta adreso estas lucas.vignoli.reis@gmail.com. Sendu ideojn, sugestojn, kaj ankaŭ indikojn pri kiel trovi sponsoradon. Estu tio pri mia nuna vojaĝo aŭ pri la venonta BEJO-Ataŝeo. Aŭ se vi havas ian ajn helpon por oferi, ĉiam bonvenas ĝi.

Mi ŝatus ĉi tie danki James VASCO MILANEZ, tre aktiva amiko de Brazilo kiu instruis Esperanton al mi kaj al mia familio. Mi ŝatus danki al pli da personoj, ĉar la helpo de multaj estis vere esenca, sed tiamaniere mia artikolo estus duoble pli granda.

Lucas Vignoli Reis

**BKE** – Brazila Kongreso de Esperanto

**BEJK** – Brazila Esperantista Junulara Kongreso

**BEL** – Brazila Esperanto-Ligo

**IJF** – Internacia Junulara Festivalo



Mi, kiu estas en la mezo de la foto, kaj mia amiko Johano ankaŭ el Brazilo, partoprenantaj konkurson de mezepokaj kostumoj.

**PSI** – Printempa Semajno Internacia en Germanio

**IS** – Internacia Seminario en Germanio, junulara novjarfesto

**HELA** – Humura Esperantista Libera Aranĝo

**BEJO** – Brazila Esperantista Junulara Organizo

---

## Esperanto-kurso por geskoltoj

Raportas Espero Venki, la nacia reprezentanto el Barato

Okazis Esperanto-kurso por geskoltoj en la lernejo *St. Thomas School, Whitefield*, Bangaloro, suda Hindio, de la 21a de januaro ĝis la 2a de februaro 2007, do dek-taga kurso. Organizis ĝin S-ro Venkatesh Reddy, la skoltestro kaj Esperantisto, al tre entuziasmaj geskoltoj kiuj jam sciis pri la lingvo Esperanto (dankegon al s-ro Steele kaj Katja Steele), sed antaŭe ne havis ŝancon lerni la karan lingvon.

Ĉeestis pli ol 52 geskoltoj en unu klaso, kiun S-ro Venkatesh Reddy mem gvidis, kaj okazis paralele alia klaso (ne la geskoltoj) kiun S-ro Dennis Keefe el Francio gvidis al 51 gelernantoj de la sama lernejo.

La kurso estis tute nova: la geskoltoj ludis, ŝercis, desegnis kaj lernis Esperanton. Ili partoprenis en konversacian ekzercadon kaj kelkfoje lernis sendepende. Kiam la lernantoj (skoltoj) konstruis siajn frazojn, mem legis,

aŭdigis al aliaj kaj ripetis por plifirmigi aŭ korekti siajn frazojn, ili povis haltigi, refari ekzercojn aŭ aŭskulti siajn proprajn dirditaĵojn. La geskoltoj paroladis senĉese, kaj senĉese volis scii multe pri Esperanto. Tiu aspekto evidentiĝis eksterordinare interesa.

La organizanto estis reprezentanto de la Skolta Esperanto-Ligo (SEL); li konis la metodon kaj sciigis al geskoltoj pri SEL, kaj pensis pri skolta metodo instrui al ili. Fine de la kurso ili povis paroli kelkajn vortojn kaj frazojn kaj kompreni multon. Ili trafolumis la libron *Ĵamborea Lingvo*.


Kiel kutime la lasta tago venis kaj estis festo, kie la geskoltoj havis atestilojn kiujn "Espero venki" presigis kaj disdonis. La geskoltoj estis tre feliĉaj kaj ili promesis disvastigi Esperanton inter si mem en tendoj, kaj helpi aliajn geskoltojn ekstudi Esperanton.

# Revoluciaj retejoj

Dum la pasintaj monatoj ni lanĉis du novajn retejojn: **Eklaboru.com** kaj **Amikumu.com**. Resume, en Eklaboru oni povas trovi laboron aŭ (kun)laboranton. Per Amikumu oni povas trovi lokajn esperantistojn kaj alŭti fotojn por ke la tuta mondo povu vidi ilin. Nia celo iusence estas ŝanĝi la manieron en kiu esperantistoj vidas sian komunumon. Oni ĝenerale ne atendas profesiajn retejojn en Esperantio, ĉar ili estas pli malpli farataj de volontuloj. Oni ankaŭ ne atendas, ke oni povu perlabori per Espe-ranto... oni kutime lernas Esperanton simple por amikumi.

## Eklaboru

"Esperanto ne estas lingvo de komerco". Ĉu? Se ni estas ho-nestaj, ankoraŭ ne... *Eklaboru* volas ŝanĝi tion. Esperantistoj estas ofte tre entreprenemaj homoj kun ege neordinaraj hobiaj kaj okupoj. Ĉefe rilate tradukadon kaj komputiladon indas serĉi spertulojn en Esperantujo. Ĝis nun tio ĉi ne estis facila tasko. Kiel kontakti esperantistaron pri tio? Per la revuo Esperanto? Eblas, sed certe ne estas la plej oportuna maniero. Simila problemo estas trovi volontulon, ekzemple, por la pozicio de TEJO-volontulo en UEA aŭ por redakti Esperanto-revuon.



Per *Eklaboru* nun pli facilas enspezi monon en Esperantio

En la retejo Eklaboru.com entreprenistoj kaj asocioj povas doni informon, ke li aŭ ŝi serĉas kunlaboranton. Estas eblo indiki ĉu la laboro estas pagata aŭ ne, ĉu temas pri laboro per interreto aŭ ne ktp. Esperantisto, kiu volas labori, ĉu partatempe, ĉu plentempe - ĉu pagite aŭ ne, povas alŭti vivresumon.

Finfine ankaŭ Esperantio disponas pri profesie farita laborserĉo-retejo - ni disvastigu kaj uzu ĝin!

## Amikumu

Pro tio, ke Esperanton nun oni ĉefe lernas por amikumi, ni kreis ankaŭ Amikumu.com. Ni konstatis, ke ne ĉiam facilas ekhavi kontaktojn kun esperantistoj, ĉu en propra regiono, ĉu kun samaj interesoj. Momente ĉefe post longa aktivado ene de la movado kaj ĉefe per renkontiĝoj, eblas ekhavi internacian amikaron. Ni volas plifaciligi la interkonatigon kaj plene profiti dank' al la avantaĝoj de interreto.

En Amikumu ĉiu povas krei profilon en kiu li aŭ ŝi prezentas sin. Vi povas interalie aldoni al tiu ĉi profilo pri kio vi interesiĝas kaj alŭti fotojn. Poste eblas en Amikumu serĉi esperantistojn, ekzemple laŭ interesoj, kaj aldoni certan personon - amikon - al via konto. Tio similas al la eblocoj, kiujn donas la retejoj MySpace aŭ LiveJournal.


Verŝajne plej interese en Amikumu estas la eblo vidi ĉiujn uzantojn sur *Google Maps*. Tiel oni povas vojaĝi ĉirkaŭ la mondo vidante kie kiu loĝas. Estas aparta paĝo kiu montras al vi liston de uzantoj ordigitaj laŭ proksimeco de vi, do vi povas malkovri nekonatajn esperantistojn eĉ en via urbo! Ankaŭ eblas babili, diskuti en forumo, aŭskulti radion, rigardi videojn kaj ludi Skrablon.

Estas multaj planoj pliampleksigi la potencojn de Amikumu. Ekzemple ni intencas doni al vi la eblon krei grupojn (alternativon

al Jahugrupoj), vikiojn, blogojn kaj vojaĝ-planojn. Sendu al ni viajn proponojn!

Noto: tiu ĉi artikolo estas komune verkita de Yves NEVELSTEEN, Chuck SMITH kaj Judith MEYER

La teamoj de Eklaboru kaj Amikumu



**amikumu** BETA

Serĉu:

Uzantnomo:

Pasvorto:

[Krei konton](#) | [Forĝesi pasvorton?](#)

Hojmo
Membroj
Fotoj
Amuzajoj
Ludoj

## Bonvenon al Amikumu!

Ĉu vi satus trovi interesajn esperantistojn apud vi?... aŭ vidi la mondon per aliaj okuloj? Nun vi povas fari tion per la unua interkona retejo en Esperanto, Amikumu! Pote kaj skribe esprimu vin kaj influu la mondon, la sola limo estas via imago... Ni nun havas 1079 membrojn en 78 landoj kaj 2248 fotojn. Venu kaj amikumu kun ni! Jen [pliaj informoj](#).

**REKLAMO**

**Ludu Cantu:** *Faŝti-lumo, romancu, interŝange, batalu, ludoj, amikumu kaj amuzaj... ĉio en Esperanto!*


**11E 2007:** *La plej zelis Eo-entombigo por vortoj aj-aj-aj! (E: ĝi plaĉas al homoj, (A): plaĉas...)*

**NOVAJ FORUMIAJ TEMOJ**

Se vi preferas ĝi tiamanda tiu tano en via D...  
[Esperanta si filo en Valhalla](#)  
 Naturaj orotoj  
[Mi rezonas kien si oni kien vojaĝi](#)  
[vortolude](#)


plena forumo

Amikumu ĉi tie Astrologio Biografio Burok, Bulliŝi Ekologia Ĝimo Ĥirio Ĥi ozoĝo Ĥizko Fotado Ĥistorio Ĥibalo Ĥitaro Ĥoo Ĥistorio Ĥinstruado Ĥinterreto Ĥantado Ĥino Ĥomputiko Ĥomputilo Ĥomputiloj Ĥilo Ĥirado Ĥulturo Ĥuado Ĥirio Ĥinvisiko Ĥonoj [lingvoj](#) Ĥonkso Ĥiraporo Ĥatematiko Ĥuziko Ĥuro Ĥocio Ĥolitiko Ĥrogramado Ĥsikologio Ĥicino Ĥirano Ĥiritismo Ĥirito Ĥarito Ĥradikado Ĥurismo Ĥeterismo Ĥibedo Ĥiĝado Ĥiĝado Ĥiĝado Ĥiĝado Ĥiĝado Ĥiĝado Ĥiĝado




2007 Amikumu


**HARARDAJ FOTOJ**




[MiUzantnomo](#)




[luzii](#)




[Saku](#)



[Juu](#)



[Mara](#)



[manuone](#)

La enirpaĝo de Amikumu

tejo tutmonde

13


# Recenze

Marina Yaguello, *Les langues imaginaires. Mythes, utopies, fantasmes, chimères et fictions linguistiques* (La imagitaj lingvoj. Lingvaj mitoj, utopioj, fantasmoj, ĥimeroj kaj fikcioj), Parizo, Seuil, 2006, 360 p.

Marina Yaguello, konata lingvistino kaj aŭtorino interalie de *Alice au pays des langues* (Alico en lingvolando) kaj *Le catalogue des idées reçues sur les langues* (La katalogo de ideoj ricevataj pri la lingvoj), pritraktas plurajn aspektojn de artefaritaj lingvoj. Fakte ŝi miksas malsamaĵojn kiel serĉaĵoj pri la *lingua adamica* (lingvo de Adamo, unika pralingvo de homoj laŭ la Biblio), projektoj pri universalaj lingvoj kaj fikciaj lingvoj de romanoj (ekz. en 1984 de George Orwel aŭ en *La majstro de la ringoj* de Tolkien).

Oni ekzemple lernas ke la unua konata ekzemplo de artefarita lingvo estis la *lingua Ignota per simplicem hominem* (Nekonata lingvo por simplaj homoj) de la abatino Hilde-garde de Bingen (1098-1179). Fakte ne temis pri plena sistemo sed nur pri alfabeto de 23 literoj kaj vort-trezoro de ĉirkaŭ mil vortoj. Oni ne scias ĉu tiu lingvo estis uzata por mistikaj aŭ kriptaj celoj. Oni ankaŭ ne scias, ĉu temis pri privata lingvo aŭ ĉu ĝi estis uzata de grupeto.

Inter fikciaj kaj pseŭdosciencaj verkoj, M. Yaguello pritraktas planlingvojn, interalie Esperanton kompreneble. La unua afero kiun oni devas diri pri la aŭtorino estas ke ŝi tute ne estas esperantema. Ŝi tiel konsideras ke planlingvaj verkistoj (ŝi nomas ĉiujn kreantojn de lingvoj (fikciaj aŭ veraj) *logophile* (lingvoŝatanto)) havas diaman volon ĉar ili deziras "anstaŭi Dion, Naturon kaj Kulturon"<sup>1</sup>. Ŝi ankaŭ nomas ilin "lingvaj frenezuloj" kiel en



la pasinta titolo *Les fous du langage. Des langues imaginaires et de leurs inventeurs* (La frenezuloj de l' parolo. Pri lingvoj imagitaj kaj iliaj inventintoj, 1984), de kiu *Les langues imaginaires* estas nova kaj longigita versio.

Amuza ekstrakto estas la robotportreto de lingvo-kreanto: "Sidanta en sia studejo tapetata de libroj, li akumulas, li amasigas, li komparas, li ordigas, li listigas, li plenigas slipoj. Li estas predo de noma deliro, takso-nomia frenezo"<sup>2</sup>. Ŝi priskribas tiun homon kiel "solulo; plejofte, li eĉ laboras por la bono de la homaro kaj konvertas. Malfeliĉe, ĉiu foje kiam li

eliras el sia studejo por alfronti la publikon, kontraŭ li staras konkuradoj, ĵaluzoj, kritikoj kaj klanluktoj kiuj markas historion de la universala lingvo"<sup>3</sup>.

Lingvoŝatanto, nelingvosciencisto, idealisto, la "lingvofrenezulo" laŭ M. Yaguello ofte devenas de centra Eŭropo "el iu lando dividita kaj ŝirita de la historio"<sup>4</sup>. «Eklezio, profesoro aŭ kuracisto, li estas skribĉambro, barbetulo kaj havas okulvitrojn cirklataj de metalo"<sup>5</sup>. Ĉu ne perfekta portreto de L. L. Zamenhof?

François Parchemin, Francio  
Unue aperis en *JEFO informas* 2006/4

1 Vidu p. 42 de la libro  
2 pj. 42-43  
3 p. 45

4 p.45  
5 p. 46

## Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturalan riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Retadreso: [www.tejo.org](http://www.tejo.org)

## Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176  
NL-3015 BJ Rotterdam  
Nederlando

Tel.: (010) 436 1044

Faksilo: (010) 436 1751,

Retadreso: [uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

## Estraro de TEJO

• Chuck SMITH (Informado, UEA-Rilatoj)  
Leiblstr. 31, DE-74081 Heilbronn, Germanio  
Retadreso: [chuck@tejo.org](mailto:chuck@tejo.org)

• David-Emil WICKSTRÖM (Prezidanto, IJK)  
Fuglegårdsvænget 57, 1tv, 2820 Gentofte, Danio  
Retadreso: [dew@tejo.org](mailto:dew@tejo.org)

• François HOUNSOUNOU (Landa kaj Afrika Agado, ILEI-Rilatoj)  
B.P. 226, BJ- Lokossa, Mono, Benino  
Retadreso: [frank@tejo.org](mailto:frank@tejo.org)

• Haris SUBAŠIĆ (Eksteraj Rilatoj, Vicprezidanto)  
Zagrebačka 80, BA-88000 Mostar, Bosnio-  
Hercegovino  
Retadreso: [hara@ikso.net](mailto:hara@ikso.net)

• Katja IGNATIEVA (Kasistino)  
c/o Magnini via Don Minzoni 38, IT-20091 Bresso  
(Mi), ITALIO  
Retadreso: [katja@tejo.org](mailto:katja@tejo.org)

• Valentina SIDOROVA (Ĝenerala Sekretario)  
3, rue des Nereides, 78180, Montigny-Btx, Francio  
Retadreso: [valentina@tejo.org](mailto:valentina@tejo.org)

## Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
- eblecon partopreni en seminarioj
- eblecon havi blagon ĉe [tejo.org](http://tejo.org)
- eblecon involviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur [www.tejo.org/patrono](http://www.tejo.org/patrono) aŭ de la Centra Oficejo).

## Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe [www.tejo.org/aktivula\\_trejnado](http://www.tejo.org/aktivula_trejnado))

## Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da eblecoj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agaderoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" - TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo - eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmaniero, bv. rigardi ĉe [www.uea.org/alighoj/pag\\_manieroj.html](http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html) aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

## Multe pli ol nenio

Martin WIESE, antaŭe membro de Amplifiki kaj Persone, eldonis sian unuan sol-albumon. Sub la nomo *Pli ol nenio* li prezentas al ni multe pli ol nenion.



Multaj jam longe atendis ĉi tiun lumdiskon de la antaŭa ĉefkantisto de Persone. Kaj ili certe ne seniluziiĝos: La albumo tuj surprizas nin per sia altnivela profesieco kaj diverseco.

Kompare kun la lasta albumo de Persone (*Sen*), kiu estis tute akustika, la nuna albumo denove plenas je pli malmolaj rokecaj sonoj. Sed ankaŭ la ŝatantoj de molaj kaj melodiaj sonoj trovos taŭgajn kantojn. Laŭ Martin mem, la enhavo de la albumo estas "ĉio inter kanzonoj kun nur akustika gitaro ĝis preskaŭ punko". Kaj ankaŭ la metaforplenaj tekstoj havas tre variajn temojn: amo, nia materia socio, "plendado pri la malfacilaĵoj de la viv" ktp.

La nomo de la albumo venas de samnoma

kanto, kiun Martin jam antaŭe kantis kun Persone; la nova versio de la kanto *Pli ol nenio* estas multe pli rokeca ol la antaŭa versio. Alia interese rekantita kanto estas *Vivo duras sed vi molas*.

La tekstoj, kiel antaŭe ĉe Persone, estas gramatike kaj prononce senerraj kaj ofte poeziecaj: Indas ree kaj ree atente aŭskulti ilin por tute kompreni ilin; kelkaj tekstoj unua-vide ŝajne sensencaj indas je plua pripenso, ekzemple "Mi ne vivas tie ĉi / Mi nur ekzistas / Sed mi ekvivas en la paŭzoj / Kaj en la interspacoj". La sola eraro kiun mi povis trovi estas en la teksto de *Pli ol nenio*, kie Martin kantas kaj la tekstolibreto skribas *pejsaĝ'* anstataŭ *pejzaĝ'*, kvankam en la antaŭa versio de la kanto Martin korekte prononcis kaj la teksto-

libreto korekte literumis tiun vorton.

Bedaŭrindas ke la albumo enhavas nur tridek ok minutojn. Sed tion iagrade kompensas la interesaj aldonajoj: Sur la lumdisko troviĝas ankaŭ mp3 kun ok-minuta remikso de la kanto *Homoj kiel mi* farita de la diskjokeo Roĝer Borĝes. Aldone estas du videotoj, *Martin en KEF* kaj *Videosesio Martin*, en kiuj Martin rakontas pri la kreo de la disko kaj oni povas spekti lin kanti.

Do entute temas pri nemalhavebla albumo por ĉiuj esperantistaj rokŝatantoj, kaj precipe por tiuj kiuj ŝatis na Persone.

Marcos CRAMER, Britio kaj Germanio